

North American

ESPERANTO REVIEW

NORDAMERIKA ESPERANTO-REVUO

Marto - Aprilo • 1961



SEATTLE CHAMBER OF COMMERCE

Seattle, ELNA Convention City for 1961.

ESPERANTO REVIEW

Vol. 9, no. 2

Donald Broadribb, Editor

5615 Woodlawn, Chicago 37, Illinois, U.S.A.

ublished bi-monthly by the ESPERANTO LEAGUE
OR NORTH AMERICA, INC., as its official organ.

Regular Subscription \$2.00 per year
Gift Subscription \$1.75 per year
or three for \$4.00 per year
Bulk Orders, ten copies \$ 1.50
(ordered in advance)

All dues and subscriptions should be
sent to the treasurer.

Material for the May-June issue of the Review
must reach the editor by May 1st.

OFFICERS of ELNA

President: David B. Richardson
RFD Box 81, Eastsound, Wash.

Vice-President: Charles E. Peterson
8314 E. Florence, Downey, Calif.

Secretary: Conrad Fisher
808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania

Treasurer: Adrian Hughes
476 So. Bailey Ave., Hillsboro, Oregon

EXECUTIVE BOARD

Armin F. Doneis, Sr.,
P. O. Box 105, Pharr, Texas

Howard G. Borden
865 Lower Ferry Road, Apt. 103, Trenton 8,
N. J.

Mrs. Mary Gibson
P. O. Box 117, Riverdale, Fresno County, Cal.

Thomas A. Goldman
7008 Millwood Road, Bethesda 14, Md.

Wm. Harmon
3122 Silva St., Lakewood, Calif.

John L. Lewine
50 Overlook Terrace, New York 33, N. Y.

Catherine Schulze
410 Darrell Road, Hillsborough, Calif.

H. K. Ver Ploeg
1908 E. 8th Ave., Spokane 32, Washington

Sino Martha Walker
2846 Monticello Road, Napa, Calif.

THE ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA,
INC., is a non-profit organization to encourage the
use of the International Language, Esperanto.

Membership Dues: Regular Members, \$3.; Sup-
porting Member, \$5.; Patron, \$10; Life Member,
\$50; Man and wife, each having privileges of
Regular Member, but receiving only one copy of
publications, etc., \$4.00.

Make all checks and money orders payable to
"Esperanto League for North America, Inc."

AGOJ KAJ DECIDOJ DE LA
ELNA ESTRARA KOMITATO

(61-IX) ELNA Executive Committee
recommends and urges amendment of the
Constitution enabling the Executive Com-
mittee to increase membership dues to
more nearly meet the changing needs and
conditions of the League. (ELNA's Secre-
tary has been instructed to mail copy of
proposed amendment and increased dues
to each member in special letter.

(61-X) Approves holding Ninth
ELNA Convention July 6-9th at Mayflow-
er Hotel, Seattle, Washington according
to schedule and program proposed by LCC
Secretary, Ferd Carlson. Congress Fees
\$10.00.

Every Esperantist in America should read this vital article

ESPERANTO'S DEADLY ENEMIES

By David Richardson
President, the Esperanto League for North America

In a leading national trade journal there appeared recently a long article about the language problem and communication in the space age.* Here is what the writer -- a usually well-informed author and an editor of two large publications -- has to say about Esperanto:

"We can dismiss Esperanto and similar synthetic languages as an idealistic mirage which has not moved off dead center for over 70 years. Nobody wants to learn a language which virtually nobody else speaks, when with the same time and effort they could learn one spoken by hundreds of millions."

Such a statement from a man who should know better is to us both astonishing and consternating. Putting Esperanto in the same class as "similar synthetic languages"; alleging the movement "has not moved off dead center for over 70 years"; inferring that "virtually nobody" speaks Esperanto and that the various national languages can be learned "with the same time and effort" as Esperanto are basic factual errors immediately obvious to anyone who is at all informed on the subject.

And, not only was this writer uninformed -- or misinformed -- but now thousands of his readers are also misinformed for they will accept, in the absence of any contradiction, what they read as being factually correct.

Nor is Telephony the only large publication to have done this kind of disservice to our movement and to the cause of breaking down the language barriers. Some years ago a national news magazine said the world-wide Esperanto movement amounted to only "half a hundred zealots". Another widely read periodical called Esperanto "a juiceless cause". More recently a popular picture magazine said, in an editorial about a certain quasi-religious movement, that it was "no more a religion than Esperanto is a language". Many, many more examples could be listed.

It would be easy to blame the editors of these publications for printing such distorted views of the International Language movement. But this would not correct the situation, nor would it be fair. It is not the editors who are at fault; it is we who are at fault for not having done a better job of informing them.

Ignorance of the true facts about Esperanto is one of the deadly enemies we face in our struggle to break the language barriers. We must hate this enemy; we must never pass up an opportunity to fight him; and we must conquer him -- or he will surely conquer us.

* Telephony, Oct. 29, 1960

Nor is the general uninformedness about Esperanto the only such enemy we face. Here is an excerpt from a letter written by the Supervisor for Modern Foreign Languages in the Department of Public Instruction of an American state:

"I believe the principal stumbling block in the way of Esperanto's wide acceptance is in that it lacks a native culture which pervades and is an integral part of every living language today. It has been said by Dr. Charles A. Hockett, noted linguist of Cornell University, that language cannot stand without culture and culture cannot stand without language. For this reason I believe that Esperanto being a fabricated language and having no native culture of its own, will encounter great difficulty in being espoused as the medium of communication for any long-established ethnic language."

This kind of argument reminds us that the Wright brothers' first flights were almost universally denied by the newspapers; the reporters, instead of going to Kitty Hawk to see for themselves whether the Wrights' machine could fly, spent their time interviewing the learned professors of the day, who assured them on the soundest scientific principles that flight by a heavier-than-air craft was impossible.

Today any scientist knows when there is a conflict between a theory and a fact, you discard the theory, not the fact. And the fact is that Esperanto works.

We know it works; we have put it to work in our Universal Congresses, in our literature, in our correspondence, in our trips abroad; and it served us wonderfully in each of these ways.

But the language-without-culture theory sounds good -- too good. It has a nice scientific ring to it and seems to have the weight of the experts behind it. That the theory is wrong does not, in itself change this. And so the language-without-culture theory is the second deadly enemy of Esperanto. But we must remember that the enemy is the theory, not the theorists. If the language people still believe in their theory, it is largely because we have thus far failed to prove to them that the theory is wrong. The burden of proof is on us, and not on them.

But these enemies pale beside the third deadly enemy, which is also mother and father to the first two. That writer in Telephony almost put his finger on it, at that; the statement quoted would be very nearly right, if he had added just three words: "in this country". For here in the United States of America, it is sad to admit, but nonetheless true, that Esperanto has hardly "moved off dead center for over 70 years".

Quibble with this if you will. The "70 years" part may be a bit off. But surely there can be no denying Esperanto's position today is, if anything, less strong than it was 50 or 60 years ago, even though on the international level great advances have been made and continue to be made at a greatly accelerating rate.

The fact remains that many cities in Europe have more Esperantists in their population than there are in all of North America, if our membership figures are to be taken as the criterion.

What is most incredible of all is the spirit of resignation, in our ranks, that causes many of us to accept our numerical and material weakness as a matter of course. We are so used to the Esperanto movement in America being a two-bit proposition that we suppose it has to be that way. We rationalize to ourselves that while the movement is small, the Esperanto idea is big, and so the size of the movement really doesn't matter.

But it does matter! Outsiders have no way to judge the bigness of the idea other than by the bigness (or the smallness!) of the movement. We are judged more by the numerical and material strength of the movement than in any other way! And the results of such a judgment can only be negative.

Yes, the biggest, deadliest enemy of Esperanto in this country is our own weakness. Let us be blunt: The Esperanto movement in North America, in its present state, is incredibly weak, hopelessly inept, and practically ineffectual.

Let me hasten to explain I do not mean by this any criticism whatever of the wonderful people who make up the League -- those staunch supporters of Nia Afero who struggle on, year after year, vainly trying to beat a path through the impenetrable with bare hands and empty pockets. I mean there are not enough of these dedicated workers, and that their efforts are not coordinated, and not channeled in the proper directions.

I am not preaching defeatism. Far from it! I believe in Esperanto with every fibre of my being. I do plead for a realistic appraisal of our present condition, and for a common-sense plan to change our weaknesses into strength. I do plead for a common determination not to settle any longer for a two-bit Esperanto movement in America. I plead for a great campaign to build a strong, vital, effective, winning movement that will speak for Esperanto in America with a powerful voice.

It must be done. It can be done!

(In the second article in this series Pres. Richardson will outline an important new program designed to build a more powerful Esperanto movement in America.)

WHY DOESN'T SOMEBODY

Give a talk on Esperanto to the Parent-Teachers Association in our town?

Write the Editor of our local newspaper about recent Esperanto developments?

Set up the ELNA Migrating Exhibit in our town?

Start a FUND for purchase of a Mimeograph Machine for our ELNA Secretary?

Support ELNA's program more generously with donations & Patron Membership?

WHY DON'T I DO IT MYSELF?

(Why don't you send some of your own hot ideas in to the "Why doesn't somebody" column?)



SEATTLE CHAMBER OF COMMERCE

The 9th Annual Convention of the Esperanto League for North America will be held in Seattle, Washington. The provisional program for the Convention is as follows:

July 6	8:00 p. m.	Get acquainted evening at the Hotel, with refreshments.
July 7	9:30 a. m.	Business Meeting
	1:30 p. m.	Business Meeting
	8:00 p. m.	Public Meeting
July 8	9:30 a. m.	Business Meeting
	1:30 p. m.	Ship excursion from the salt water port through the canal locks into Lake Washington. Bus from hotel to ship.
	8:00 p. m.	Banquet
July 9	9:30 a. m.	Business Meeting

The Convention will be held at the Hotel Mayflower, in the heart of the city. Convention fee: \$10, to pay the costs of the Get Acquainted Evening, banquet, ship excursion, and administrative costs (including rental of the hall) etc.

For further information, please write to the Secretary of the L. C. C., F. R. Carlson, 2116 N. 35 St., Seattle 3, Washington. Phone MEbrose 2-2181.

The 9th Convention of ELNA will take place in one of the most attractive vacation spots in North America.

Seattle is a beautiful city. All along the West side it faces Puget Sound. All along the East side lies beautiful Lake Washington. In the city itself are two lakes (Green Lake and Lake Union). Topographically, the city consists of seven hills between salt and fresh water.

Eastward, across Lake Washington, and westward across the straits, lie two large mountain chains. (In the west, the Olympic Mountains, in the east, the Cascade Mountains). Because of our mild climate, trees, bushes, and flowers grow well. Flowers are often found in our gardens throughout the winter. In the summer, plants do not wilt from drought.

Just a short trip takes you to primitive mountain forests, ski slides, mountain rivers, streams and lakes full of fish. You can find forest camping spots provided by the governmental forestry service, and many types of guest houses.

Puget Sound is full of beautiful islands and rocks, which boaters love to explore. The L.C.C. will arrange for the convention members a ship excursion from the city port in the Sound through the canal into Lake Washington. Thus, among many interesting sights, there will be a trip through a canal lock.

The L.C.C. secretary would like to hear from Convention members who, after the Convention, will wish to spend some time camping in a mountain forest and perhaps take walks down mountain paths. They should have equipment for camping, but simple picnicking in the forest campsites is also possible.

La 9a Kongreso de ELNA okazos en unu el la plej allogaj feriejoj en Norda Ameriko.

Seattle estas bela urbo. Laŭ la tuta okcidenta flanko ĝi frontas al la Marbrako Puget (Puget Sound). Laŭ la tuta orienta flanko kuŝas la bela Lago Washington. En la urbo mem troviĝas du lagoj (Green Lake kaj Lake Union). Topografie, la urbo konsistas el sep montetoj inter la sala akvo kaj la freŝa.

Oriente trans Lago Washington, kaj okcidente trans la marbrako, kuŝas du grandaj montĉenoj. (Okcidente, Montaro Opympic. Oriente, Montaro Cascade.) Pro nia milda klimato arboj, arbustoj kaj florphantoj bone kreskas. Floroj ofte troviĝas en niaj ĝardenoj dum la tuta vintro. En la somero, plantaĵoj ne velkas pro trosekeco.

Per nur mallonga veturo oni povas atingi primitivajn montarbarojn, skigit-ejojn, montajn riverojn, riveretojn kaj lagojn plenajn je fiŝoj. Oni trovas arbarajn bivakojn provizitajn de la registara forsta servo kaj ferigastejojn multspecajn.

Marbrako Puget estas plena je belaj insuloj kaj insuletoj, kiujn boatistoj amas esplori. La L.K.K. aranĝos por la kongresanoj ŝipekskurson de la marbraka urb-haveno tra la kanalo en Lagon Washington. Tiel, inter multaj interesaj vidindaĵoj, oni spertos ŝipveturon tra kanalkluzo.

La LKK-sekretario deziras informiĝi pri gekongresanoj kiuj, post la Kongreso, deziras pasigi iom da tempo per bivakado en monta arbaro kaj eble piedirado laŭ montaj vojetoj. Ili prefere havu ekipaĵon por bivakado, sed nura piknikado en la arbaraj bivakoj ankaŭ eblas.

ESPERANTO NEWS NOTES

The Northern California Esperanto Association held a regional meeting in Sacramento, February 19. 70 persons attended. Prof. Milton E. Davis of Pacific College, Angwin, California, spoke on the literary value of Esperanto.

A new Esperanto class has begun under the direction of Ida Belle Craig in the Fremont School, Sacramento, California. Some fifteen students are enrolled in this direct method course.

A class begun last September in the Fremont School continues, with considerable success under the guidance of its two teachers, Mrs. Frasquita Overmire and Mrs. Morgan. Sixteen students attend regularly.

At the Brotherhood Week dinner in San Mateo California, Feb. 21, sponsored by 23 local civic and religious groups, an Esperanto exhibit was presented by the Peninsula Esperanto Club.

A gift from Warren Gould has made it possible for all libraries in Massachusetts in cities with population of 25,000 residents or more to receive the Esperanto Review. This is an action that could well be imitated in other parts of the continent.

Esperanto exhibits have been arranged recently in the public library in Amherst, Mass., and in the Duggan Junior High School in Springfield, Mass.

Two advanced courses in Esperanto, with a total of 94 students, are being held under the leadership of Mrs. Rondeau, president of the Greater Springfield Esperanto Club, in the Duggan Junior High School of Springfield, Mass.

Catherine Schulze spoke to 60 children of the First Methodist Church, Burlingame, California, on January 29, and on February 2 spoke to the Girl Scouts of St. Charles Catholic School in San Carlos, Cal.


The program schedules of the Voice of America for February-April feature a half-page notice of the Esperanto broadcasts reported in our last issue. These program schedules are published in separate editions for Latin America, Africa, Europe, the Far East, the Middle East, and South Asia.

During Zamenhof Week last December the Glen Ridge, N.J. Savings & Loan Association sponsored an Esperanto display in memory of the birth of Dr. L. L. Zamenhof. The Secretary of the Central Office of ELNA was instrumental in contacting the local members to furnish materials for the display.

"The Carolina Israelite", bi-monthly newspaper published by Harry Golden, includes a 500 word article on Esperanto in its January-February issue of this year. The article reviews briefly the history of the Esperanto movement, and then turns to a mention of Esperantist Don Stephens who brought the international language to Harry Golden's attention. We would recommend "The Carolina Israelite" to those of our readers who are interested in a high level publication of the character made famous by Harry Golden in his books "Only In America", "For 2¢ Plain", etc. Address: The Carolina Israelite, P.O. Box 2505, Charlotte, North Carolina. (\$3.)

November 25, 1960, the first youth hostel utilizing Esperanto was opened in Fredericia, Denmark, with the name Pro Pace - Por Paco.

The literary periodical Norda Prismo, appearing in the International Language in Stockholm, recently carried a memorial article on the Swedish painter Isaac Grünewald. As a young art student



A 400-page Chinese Anthology has recently been published with an introduction by the writer Mau Dun. The anthology represents the works of the last ten years in poetry and novels. It was compiled by seven translators and two revisionary translators.

Selected poems of the Brazilian poet Castro Alves (1847-1871) have just appeared in a 186 page translation in the International Language. Castro Alves' style, especially in the poem "The Prophet"; is similar to that of the Bible prophets, for example Isaiah. Here, a hundred years ago, he defends Africa against exploitation and enslavement. The translation, in verse, is by Leopoldo H. Knoedt. It was published by the University of Bahia, Brazil.

he was inclined to rebel against naturalism and romanticism; in 1908 in Paris he was influenced by Cezanne and Matisse, but all his life his art showed relationship to expressionism and realism.

The Daiei Film Studios in Kioto, Japan, famous for high quality films, among them RASHOMON, has prepared a film entitled THE ASSAULT OF JOHN ARIMA, in which the International Language is used. The film describes the pressures between Japanese and European colonizers of 350 years ago. In order to avoid offending any European nation, the director, Daisuke Itow, has the European invaders speak in Esperanto. The same thing was done by an American film producer in making the film SPECIAL DELIVERY, starring Joseph Cotten.

A Report on the International Catholic Esperanto Union, I. K. U. E.

For many Catholics, the "needed impetus to the lay apostolate for which Rome has so long been pleading", may well be brought about by Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista -- the International Catholic Esperanto Association. For IKUE (an integrated and harmonious part of other world-wide Esperanto Associations) is a form of action that is catholic as well as Catholic.

Founded in 1910, the road was not easy for IKUE. Disrupted by the First World War, headquarters were moved from country to country. During Spain's troubled era, the Editor of "Espero Katolika" (the official organ of IKUE) was killed by Communists; and in 1939, with headquarters in Czechoslovakia, the Editor fell victim to the Nazis. Then to Holland, where the movement was engulfed by the Nazi invasion. Nevertheless, as soon as possible after World War II, our apostolate was revived and headquarters are now established at 2 Frederikstraat, Dordrecht, Holland.

In association with IKUE, is I.K.I. (Internacia Katolika Informejo) which, since 1934, has distributed free literature to Esperanto inquiries regarding the Church. IKUE also sponsors "Birdo", an Esperanto publication for young people.

In our own country, IKUE members work ceaselessly for the cause of establishing Esperanto as a common world language. In Washington D.C., at the Voice of America, Dr. William Solzbacher is in charge of the highly successful Esperanto series of broadcasts. Father Gabriel N. Pausback, O. Carm., Chicago, has had articles advocating the use of Esperanto published in America and in the Carmelite publication Mary. Father is now in Fatima, Portugal, where great need for a common language exists because of the wide diversity of languages spoken by pilgrims who journey to Fatima from many parts of the world.

Also writing in America, on "The Case For Esperanto", was Father John LaFarge, former Editor-in-chief of the magazine; and, an article entitled "Esperanto Is Easy" by William D. Ryan in the Catholic Digest alerted many U.S. Catholics to the value and scope of Esperanto.

IKUE now has representatives in 43 countries. The yearly dues of \$2.00 include Subscription to *Espero Katolika*, published monthly in the Netherlands. Esperanto literature, as well as a free introductory Esperanto correspondence course, are offered to interested Catholics in the United States by the writer. Address: 2109 Parkwood Dr., N.W., Warren, Ohio.

The cause of Esperanto as a world language has had the approval and blessing of four Popes; and it is our fervent hope that when we convene, the summer of 1962, in the Eternal City, the U.S. laity as well as the U.S. clergy will be represented in numbers proportionate to our European Catholic samideanoj -- and that the present Holy Father, John XXIII, may recall, with hope of fulfillment, the prophecy of his saintly predecessor Pius X, that: - "Esperanto has indeed a great future before it".

LETTERS TO THE EDITOR

Letters to the Editor of local newspapers are among the most successful means of letting the general public know about Esperanto. The Review will publish a series of especially effective Letters which have been printed in local papers around the country, as examples of what can be done.

Esperanto, the only long-tested, living international auxiliary language, offers scientists and laymen alike the means to be their own interpreters and ambassadors abroad. Ever evolving from the fundamentals established in 1887 by L. L. Zamenhof, Esperanto retains its simple and regular grammar, pronunciation, and orthography, while its expanding vocabulary and stylistic richness keep abreast of science, literature, and the full range of diverse human communication. In 1954 UNESCO officially recognized the achievements of Esperanto in international rapprochement, and brought the Universala Esperanto Asocio (UEA) into consultative relations. Some 30 radio stations broadcast regularly in Esperanto; in 1960 the Voice of America beamed Esperanto programs to a world-wide—and very responsive audience. One program in this initial series featured Dr. Alan Waterman, head of the National Science Foundation.

Built on a word stock 80% Romance, but using grammatical structures (e.g. agglutination) found outside the Romance group of languages, Esperanto combines the vocabulary common to Western science with a logical, regular grammar yielding great richness of forms, flexibility of style, precision, and clarity. Esperanto takes 1/5 to 1/15 the time to learn that national languages do; its great popularity in the Orient corroborates the fact that it is the easiest Western language for non-Indo-Europeans to learn. The Western scientist can read Esperanto *precisely* after a few days, and write it after a few weeks of self-teaching;

he should be aware that Interlingua—*almost* readable at sight—presents great difficulties in active use; only a handful of specialists write it, and it is not a spoken tongue, notwithstanding a few prepared speeches.

The many unique monolingual conferences held every year by Esperantists of varied interests put to shame the remarkable but always faulty simultaneous translation systems now in vogue. More important: with Esperanto the conferees can speak to one another regardless of their national origins!

The largest Esperanto library boasts 30,000 items; currently there are over 100 periodicals, whose Esperantist readers live in 80 different countries. To date, 110 scientific and technical dictionaries have been published; there are several scientific journals, and some 80 national language journals which publish Esperanto articles or summaries. The *Internacia Sciencia Esperanto Asocio* recently celebrated its 50th year with a volume of original papers—ranging from Astronomy to Zoology—demonstrating the full capability of Esperanto in the varied realms of modern science. H. Sebert, J. J. Thomson, W. Forster, M. Frechet, S. Nishi, H. Sirk, P. Neergaard and scores of others are among the active Esperantist-scientists of past and present.

The teaching of Esperanto in elementary schools is under way in several countries. The movement is steadily gaining in popular strength and official recognition (7 nations have issued commemorative postage stamps). Scientists can now realize the marvelous possibility of having all technical material written, or at least summarized, in a living, spoken, international language. No one need be speechless in our shrunken global neighborhood today. Esperanto is ready now. The burden of proof rests upon those who say that Esperanto is not the best answer to Babel. Mi sendos al vi informon pri la Lingvo se vi skribas al mi (74 Fenwood Rd., Boston 15, Mass.).

E. James Lieberman, M.D.

Society for Social Responsibility in Science

SSRS NEWSLETTER No. 102

Inaŭguraci-Prelego de Prezidanto

John F. Kennedy



(La 20an de januaro, 1961, Usono ricevis novan prezidanton, John Fitzgerald Kennedy. La prelego kiun li faris tiutage estas diskonigita tra la mondo kaj ricevis laŭdon tiel en la "Oriento" kiel en la "Okcidento.")

Kuncivitanoj:

Ni festas hodiaŭ ne venkon de politika partio, sed feston pri libereco - simbolon de fino kiel ankaŭ de komenco - kiu signifas renoviĝon kiel ankaŭ ŝanĝon. Ĉar mi faris antaŭ vi kaj la Plejpotenca Dio la saman solenan ĵuron kiun preparis niaj prapatroj antaŭ preskaŭ 1 3/4 jarcentoj.

La mondo nun estas tre malsimila. Ĉar la homo tenas persiaj mortemaj manoj la kapablon aboli ĉiun formon de homa malriĉeco kaj aboli ĉiun formon de homa vivo. Kaj tamen la samaj revoluciaj kredoj pro kiuj batalis niaj prapatroj restas pribatalataj tra la mondo - la kredo ke la rajtoj de la homo venas ne pro la bonvolemo de la ŝtato sed el la mano de Dio.

Ni ne rajtas forgesi, ke ni estas la heredantoj de tiu unua revolucio. Sonu la vorto de nun kaj de ĉi tie, al kaj amikoj kaj malamikoj, ke la torĉo estas transdonita al nova generacio de usonanoj - naskitaj dum ĉi tiu jarcento, harditaj per milito, disciplinitaj per malvarma kaj amara paco, fieraj pri nia deantikva heredo - kaj malpretaj vidi aŭ permesi la malrapidan malestablighon de tiuj homrajtoj al kiuj ĉiam dediĉis sin ĉi tiu nacio, kaj al kiuj ni estas dediĉitaj hodiaŭ.

Ĉiu nacio sciu, ĉu ĝi bonvolas aŭ malbonvolas al ni, ke ni pagos ĉian prezon, portos ĉian ŝarĝon, suferos ĉian malfacilon, aŭ kontraŭos ĉian malamikon por certigi la ekzistadon kaj sukceson de libereco.

Tion ni ĵuras - kaj pli.

Al tiuj malnovaj kunbatalantoj kies kulturan kaj spiritan originojn ni partoprenas, ni ĵuras la lojalecon de fidelaj amikoj. Unuigitaj, malmulton ni ne povos fari rilate al amaso da novaj kooperativaj entreprenoj. Dividitaj, malmulton ni povos fari - ĉar ni ne povas renkonti fortan spiton neunuigitaj kaj disigitaj.

Al tiuj novaj ŝtatoj kiujn ni nun bonvenigas en la grupon de liberuloj, ni ĵuras

ke unu formo de kolonia regado ne forpasis nur anstataŭote de ankoraŭ multe pli fera tiranio. Ni ne ĉiam supozos ke ili subtenos ĉiun opinion nian. Sed ni ja ĉiam trovi ilin forte subtenantaj sian propran liberecon - kaj memorantaj ke, dum la pasinteco, la personoj kiuj malsaĝe klopodis trovi potencon rajdante sur tigra dorso neeviteble interniĝis.

Al tiuj popoloj en la domaĉetoj kaj vilaĝoj de duono de la mondo baraktantaj por rompi la ligilojn de amasa mizero, ni ĵuras ke ni faros ĉion eblan por helpi ke ili helpu sin mem, negrave kiom longe estos necese - ne ĉar la Komunistoj faras tion, ne ĉar ni volas ke ili balotu por ni, sed ĉar ili rajtas ke tiel estu. Se la libera socio ne povas helpi la multajn malriĉulojn, ĝi neniel povas savi la malmultajn riĉulojn.

Al niaj fratinaj respublikoj sude de nia bordo, ni proponas specialan ĵuron - fari el niaj bonaj vortoj bonajn agojn - per nova interligo por progreso - helpi liberecojn kaj liberajn registarojn forskui la ĉenojn de malriĉeco. Sed tiu paca revolucio de espero ne povu iĝi sklavo de malamikaj regnoj. Ĉiu najbarulo nia sciu ke ni estos kun ili por kontraŭi agreson aŭ perfidon ĉie en la Amerikoj. Kaj ĉiu alia regno sciu ke ĉi tiu duonsfero intencas resti la mastro de sia domo.

Al tiu monda asembleo de sendependaj ŝtatoj, la Unuigitaj Nacioj, nia lasta kaj plej bona espero en epoko kie la militoj multe superas nombre la pacilojn, ni denove ĵuras subtenon - por eviti ke ĝi iĝu nur kunveno por insultoj - por fortigi ĝian protekton al la novaj kaj la malfortaj - kaj por plivastigi la terenon pri kiu ĝi povas agi.

Fine, al tiuj nacioj kiuj emas iĝi niaj malamikoj, ni ne ĵuras sed petas: ke ambaŭ kampoj rekomencu la serĉon je paco, antaŭ ol la malluma potenco de detruado liberigita de la scienco dronos la tutan homaron per planita aŭ akcidenta sindetruo.

Ni ne rajtas tenti ilin per malforteco. Ĉar nur kiam niaj armiloj estas sufiĉaj tute sen dubo povas ni esti certaj tute sen dubo ke ili neniam estos uzataj.

Sed ankaŭ du grandaj kaj potencaj nacigrupoj ne povas esti komfortaj pri la aktuala agado - ambaŭ kampoj estas superŝarĝitaj de la kosto de modernaj bataliloj, ambaŭ prave estas alarmitaj de la senpaŭza potenciĝo de la mortiga atomo, sed ambaŭ kuras por forviŝi tiun malfortan ekvilibron de teruro kiu forpuŝas la manon de la lasta milito de la homaro.

Do ni denove komencu - memorante ambaŭflanke ke ĝentileco ne estas indiko pri malforteco, kaj ke sincereco devos esti pruvata. Ni neniam negociadu pro timo. Sed ni neniam timu negociadi.

Ambaŭ kampoj esploru la problemojn kiuj unuigas nin, anstataŭ emfazi la problemojn kiuj dividas nin.

Ambaŭ kampoj, jam la unuan fojon, preparu seriozajn kaj precizajn proponojn por la inspektado kaj limigo de armiloj - kaj transigu la absolutan kapablon detruiri aliajn naciojn al la absoluta regado havata de ĉiuj nacioj.

Ambaŭ kampoj unuigu por efektivi la miraklojn de la scienco anstataŭ ĝiajn terurojn. Kune ni esploru la stelojn, venku la dezertojn, malaperigu la malsanojn, utiligu la oceanprofundojn, kaj kuraĝigu la artojn kaj komercon.

Ambaŭ kampoj unuigu por obei pri ĉio sur la tero la ordonon de Jesaja - "malligi la pezajn ŝarĝojn ... (kaj) liberigi la subprematojn."

Kaj se komenco de kooperado estas farebla en la arbaro de suspektemo, ambaŭ kampoj unuigu pri alia tasko: krei, ne novan ekvilibron de potenco, sed novan mondon juran, kie la fortaj estas justaj kaj la malfortaj sekuraj kaj la paco eterne restos.

Ĉio ĉi ne estos plenumata dum la unuaj cent tagoj. Nek ĝi estos plenumita dum la unuaj mil tagoj, nek dum la daŭro de ĉi tiu administracio, nek, eble, eĉ dum nia vivado sur ĉi tiu planedo. Sed ni komencu.

En viaj manoj, miaj kuncivitanoj, pli ol en miaj, restos la fina sukceso aŭ malsukceso de nia entrepreno. De la fondiĝo de ĉi tiu lando, ĉiu generacio vokiĝis atesti pri sia lojaleco al la homaro. La tomboj de junaj usonanoj kiuj respondis al tiu voko estas ĉirkaŭ la mondo.

Nun la trumpeto denove vokas nin - ne por porti armilojn, kvankam ni bezonas armilojn - ne vokante nin al batalado, kvankam ni jam bataladas - sed vokante ke ni portu la ŝarĝon de longa krepuska baraktado, multjara, "ĝojante dum espero, paciencaj dum problemoj" - baraktado kontraŭ la komunaj malamikoj de la homaro: tiranado, malriĉeco, malsano, kaj la milito mem.

Ĉu ni povas prepari kontraŭ tiuj malamikoj grandan kaj tutmondan aliancon, nordan kaj sudan, orientan kaj okcidentan, kiu povos certigi pli fruktoplengan vivon por la tuta homaro? Ĉu vi helpos pri tiu historifaranta klopodo?


Dum la longa historio de la mondo, nur malmultaj generacioj ricevis la rolon defendi liberecon dum plena danĝero. Mi ne fortiras min de tiu respondeco - mi bonvenigas ĝin. Mi ne kredas ke iu el ni volus esti kun iu alia popolo aŭ iu alia generacio. La energio, la fido, kaj la dediĉo kiujn ni kunportas la la entrepreno lumigos nian landon kaj ĉiun kiu servas ĝin - kaj la brilo de tiu fajro vere povos ilumini la mondon.

Do, kunusonanoj: Ne demandu kion faros via lando por vi - demandu kion vi povos fari por via lando.

Miaj kunmondanoj: Ne demandu kion Usono faros por vi - sed kion ni povos kune fari por la libereco de la homaro.

Fine, negrave ĉu vi estas civitanoj de Usono aŭ de la mondo, postulu de ni la samajn altajn nivelojn de forto kaj dediĉemo kiujn ni postulos de vi. Kun bona konscienco kiel nia sola certa rekompenco, kun historio kiella fina juĝonto priniaj agoj, ni antaŭeniru por gvidi la landon kiun ni amas, petante Lian benon kaj Lian helpon, sed sciante ke tie sur la tero la laboro de Dio devas esti vere nia.

(Tradukis Donald Broadribb)



Sekretoj de la Marestaĵoj

de Peter Giunio
reverkita de Marinko Ĝivoje

Zagreb: Kroatia Esperanto-Servo, 1960.
144 p., 73 bildoj.


Rapidu tuj al la marbordo de la Maldivaj Insuloj en la Hinda Oceano, kaj kolektu ŝelojn de la kaŭrio! Nur 4,000 el ili sufiĉos por aĉeti ekzempleron de tiu mirinda libro (laŭ la monvaloro de tiuj konkoj menciata sur p.29). Pli bone, kolektu 40,000, kaj tiel aĉetu dek ekzemplerojn, ĉar la libro estas tiel interesa, tiel bonstila, ke ĝi taŭgas ankaŭ por legado en kursoj de progresintaj Esperantistoj.

Pli serioze, mi konstatas ke la sperta Kroata priscienca raportisto Petar GIUNIO estas verkinta libron pli interesan, laŭ mia opinio, ol tiu bone konata libro de Rachael Carson. Kial mi tiel ŝatas la verkon de Giunio, mi ne precize scias. Eble ĉar en ĝi troviĝas pli modernaj faktoj ol en la teksto de Carsen. Same kiel ŝi, foje Giunio prezentas nur unu teorion pri komplika afero; tiumaniere li faras pli leginda la tekston, ne komplikante ĝin per tro multe da tamenoj kaj kvankamoj. Ĉu la pratempa maro vere estis sala, kiel Giunio asertas? Ĉu efektive la vertebraj bestoj evoluigis en sala akvo, kaj ne en freŝa? Tiaj demandoj ankoraŭ ĝenas la spertulojn -- kaj tiaj vi ne estas, ĉu? Legu, do, tiun libron; ĝuu ĝin; kaj samtempe lernu, konsciante ke la faktojn kontrolis veraj eminentuloj kiel Stöp-Bowitz, Balech kaj Neergaard, famaj kaj kiel sciantistoj kaj kiel Esperantistoj.

Ĉar kritikanto sentas la devon kritiki, mi serĉis kritikindaĵojn; sed mi trovis nur malmultajn. Fakte, la bindo estas nur el kartono. Fakte, mi estus preferinta legi la nomojn de la ilustritaj estaĵoj sub aŭ proksime de la bildoj, ne en listo (kvankam tute klara) en la librofino. Fakte, je kelkaj punktoj mi rimarkis ke la libro temas precipe pri la maro apud Jugoslavio. (En la tuta mondo, sendube, ekzistas pli multaj algoj ol la menciita nombro 600.) Sed, fakte, mi legis la unuajn tridek paĝojn en la sama posttagmezo kiam alvenis mia ekzemplero, elokventa pruvo de ties ĉarmo.

Konu Viajn Gesamideanojn

Ek de januaro 1961 ekfunkciis por trijara oficperiodo nova estraro de Kanada Esperanto Asocio. Por ke al la nordamerika samideanaro iliaj nomoj ne restu nur nomoj, ili prezentas sin ĉi tie per aŭtografietoj kaj bildoj (s-roj Roberts kaj Meier bedaŭrinde ne sendis foton):



Prezidanto de K.E.A.,
Prof. J. R. A. Mayer:

Mi naskiĝis 1932 en Budapesto, Hungarujo. 1946 mi venis al Kanado. Fininte la duagradan lernejon en Toronto mi ekstudis fiziologion kaj biokemion en Toronto. Studante tie mi konatiĝis kun Rüdiger kaj Vilma Eichholz, kiuj tiutempe estis novkanadanoj kaj kiel hodiaŭ fervoraj esperantistoj. Ĉiam interesata pri lingvoj, mi decidis lerni Esperanton, kaj en tre mallonga tempo mi lernis sufiĉe por legi ĝin.

1955 mi ekkonis, ke la kampo de mia ĉefintereso estas ekster la pure scienca laboratoria esplorado, kaj pro tio mi ekstudis filozofion, kies aspiroj estis konsiderinde pli larĝaj kaj, laŭ mi, pli defiantaj. Mi licenciatigis 1956 kaj estis feliĉa ricevi stipendiojn por daŭrigi miajn studojn ĉe la universitatoj en Rochester kaj Atlanta, Ga. Fininte miajn doktorajn antaŭstudojn mi instruis ĉe Morris Brown College en Atlanta, Ga. kaj de tie revenis al Kanado, por akcepti mian nunan postenon kiel lektoro en la filozofia fakultato de la McMaster universitato en Hamiltono. Miaj ĉefaj kampoj estas logiko kaj la filozofio de scienco, sed mi ankaŭ instruas kelkajn kursojn pri la historio de filozofio. Ĉe McMaster mi povis iniciati la enkondukon de Esperanto.

Krome mi estas jam du jarojn eduka direktoro en la Unua Unitara Kongregacio de Toronto. Ĝojigis min la sperto, ke la unitaranaro nun serioze ekinteresiĝas pri Esperanto kiel ilo por sekurigi pacon kaj intensigi internacian interkompreniĝon.

Tamen mia intereso pri Esperanto ne limiĝas je tiuj idealistaj motivoj. Mi rigardas Esperanton kiel bazan formon de ĉiuj hindeŭropaj lingvoj, kaj mi sincere kredas, ke mastrado de tiu simpla, logika lingvo fakte faciligas la lernadon de iu ajn alia okcidenta lingvo. Alivorte, Esperanto povas anstataŭigi en la 20a jarcento la latinan lingvon, kiu estis la ĉefportanto de la koncepto pri gramatiko. Pro tio ke Esperanto estas pli facila kaj ne havas tiujn ekstravagancojn de la latina lingvo, ĝi pli bone povas plenumi tiun taskon, reprezenti "ostaron" de gramatiko.

Vicprezidantino de K.E.A., Vilma Eichholz:

Mi naskiĝis 1926 en Germanujo (Silezio) kiel unua infano de kuracistoj. Mia patrino mortis naŭ monatojn post mia naskiĝo. Fininte la duagradan lernejon mi studis filologion en la universitato de Breslau ĝis ĝi fermiĝis dum la fina stadio de la milito. Instruante en elementa lernejo mi travivis la militfinon. Kune kun la



16.6 milionoj da forpelitaj germanoj el la orient-germanaj provincoj ankaŭ mi devis forlasi mian hejmprovincon. Miaj travivaĵoj montris al mi per terura realeco la frenezon de milito kaj kontribuis al evoluo de mia nuna pacifista kaj supernacia mondkoncepto.

En la brite okupata teritorio de Germanujo mi devis vivteni min unue per dommastrumado kaj poste kiel telefonistino. 1948 mi estis pro malsatmalsano sendata al Svedujo helpe de la Ruĝa Kruco. Kiel eksterlandanino mi ankaŭ tie estis devigata labori la unuajn jarojn dommastrume, sed poste mi povis labori kiel malsanulflegistino. Post tre mallonga tempo mi mastris la svedan lingvon kaj ankaŭ servis kiel tradukantino por angla kaj franca lingvoj.

1952 mi revenis al Germanujo por viziti pedagogian altlernejon, sed anstataŭ tio mi edziĝis al esperantisto, kiu baldaŭ konvinkis min pri la neceso lerni ankaŭ la internacian lingvon. Printempe 1953 antaŭ nia elmigro al Kanado ni ambaŭ partoprenis unusemajnan seminarion por Esperanto-instruistoj en Kastelo Schwöbber apud Hameln.

Niaj du infanoj naskiĝis ĉi tie (Alko 1954, Suna 1958). En nia entrepreno Esperanto Press mi laboris je la flanko de mia edzo diversmaniere por antaŭenigi nian lingvon. La esperanta kaj germana estas alterne niaj hejmaj lingvoj, tiel ke niaj infanoj edukiĝas trilingve. 1959 ni malfermis la Esperanto-Kulturdomon. Donante diversajn kursojn mi spertiĝis kiel Ĉe-instruistino kaj ĵus finis sukcesplene mian unuan universitatan kurson en Hamiltono. Laŭ peto de la prezidantino de 'Voĉo de Virinoj' mi transprenis la taskon prizorgi la internacian korespondadon, kaj mi sukcesis, ke tiu rapide kreskanta organizo pli kaj pli uzas Esperanton por ĝiaj celoj.

Sekretario de K.E.A., W.J. Maier:

Mi naskiĝis 1893 en Innsbruck, Tirol, Aŭstrujo. 1908 mi esperantistiĝis dum la 4-a Universala Kongreso en Dreseno, Germanujo, kie mi vidis ankaŭ d-ron Zamenhof. En la sama urbo mi fariĝis inĝeniero komence de la unua mondmilito. 15 jarojn poste mi edziĝis al s-anino A.L. Bevel, Antverpeno, Belgujo.

1949 ni elmigris al Vancouver Kanado kaj nun estas kanadaj civitanoj.

Kasisto de K.E.A., Christie W. Roberts:

Mi naskiĝis 1905 en London, Anglujo. Dujare mi venis al Kanado. Laŭ profesio mi estis dum sep jaroj veturanta magiisto kaj ventroparolisto, poste mi fariĝis instruisto kaj laboris tiel dum dek jaroj. Ek de 1936 mi estas komercisto kaj deĵoras kiel arbitraciisto kaj mortenketisto por la jura fako de la registaro de Saskatĉevano. 1954 mi ekprenis Esperanton per memstudado helpata de s-roj W.D.B. Hackett kaj Louis Dormont. Mi fariĝis entuziasma esperantisto kaj partoprenis kelkajn kongresojn de KEA kaj ELNA. Mi estas edzigitaj kaj havas du plenkreskajn filinojn. Ankaŭ mia edzino lernis iom da Esperanto.

MALGRANDA KONKURSO

Sciante ke vi ŝatas cerbumi, la Revuo proponas al vi kelkajn demandojn. Al ĉiu demando bonvolu mallonge kaj precize respondi, kaj la respondojn sendu al la redaktoro de la Revuo. Kiu sendos la plej multajn ĝustajn respondojn ricevos libropremion. La respondoj, la nomo de la premiito, kaj la nomoj de legantoj kiuj sendis 22 aŭ pli da ĝustaj respondoj aperos en la venonta numero. Limdato: 20 majo, 1961.

1. Kiam naskiĝis Zamenhof laŭ la juliana (malnova) kalendaro ?
2. Kiom da fratoj kaj fratinoj havis li ?
3. Kiam festis Zamenhof la ekviviĝon de la "Lingwe Uniwersala" laŭ la gregora (nova) kalendaro ?
4. Kial finis Zamenhof la gimnazian kurson en Varsovio, laŭ la gregora kalendaro ?
5. Kiam publikiĝis Volapük, kaj kiu verkis ĝin ?
6. Kiam aperis la unua esperanta libro ?
7. Kiom da esperantaj vortoj entenis la unua esperanto-rusa vortaro de Zamenhof ?
8. Kiu sendis en 1887 la unuan leteron en Esperanto al Zamenhof ?
9. Kiam aperis la unua numero de la unua esperanta gazeto ?
10. Kiam aperis la unua adresaro de esperantistoj ?
11. Nomu 4 usonajn esperantistojn en la unua adresaro.
12. Kiu estis la dua esperanta gazeto, kie kaj kiam ĝi eldoniĝis ?
13. En kiuj lingvoj aperis esperanto-lernolibroj en la jaroj 1887-90 ?
14. Kiam aperis la lasta numero de la unua esperanta gazeto ?
15. Kiam aperis la unua numero de "Lingvo Internacia" ?
16. Kiam mortis W. H. Trompeter, mecenato de Esperanto ?
17. Kiam aperis la unua numero de "The Esperantist" en Britujo ?
18. Kiam verkis Zamenhof la poemon "Preĝo Sub la Verda Standardo" ?
19. Kiam kaj kiu estis la unua esperanta gazeto en Ruslando ?
20. Kiu fondis la gazeton "Esperanto" en Francujo, kaj kiam ?
21. Kiam aperis la unua numero de "Amerika Esperantisto" ?
22. Kiu usona esperantisto verkis la lernolibron "American Esperanto Book," kaj kiam ?
23. Kiam verkis Zamenhof sian mondkonatan cirkuleran leteron al ĉiuj esperantistoj ?
24. Kiam fondiĝis la Universala Esperanto Asocio ?
25. Kiam aperis la unua numero de la "Nordamerika Esperanto-Revuo" ?
26. Kiu tradukis la dramon de Shakespearo "As You Like It," kaj kiam ?
27. Kiam venis Zamenhof al Washington, D.C., por Universala Kongreso de Esperanto ?
28. Kiu usona esperantisto faris fruan mondvojaĝon por propagandi Esperanton ?
29. Kiam kaj kie establiĝis la unua Zamenhof-monumento ?
30. Kiu verkis la unuan originalan romanon en Esperanto ? Kiam li verkis ĝin ? Kiomjara li estis ? Kiel titoliĝis la romano ?

(demandaro verkita de A. Holzhat

THANK YOU FROM THE SECRETARY

In response to my plea in the Nov-Dec REVIEW (which must have a much better impression on readers than my previous one!) the following members* sent me lots of used American stamps to be sent on to Peter Zacho in Denmark who will sell them to dealers and collectors there and give the funds received to the Tibor Sekelj APO campaign. Thanks! And keep them coming from time to time. Remember to be careful not to damage the stamps. None were damaged, but new senders may forget that damaged stamps are not wanted by collectors and so I must throw them out if I notice them, or Sro Zacho must do it when he does the final sorting. Another thing: If you find a card or envelope with a very unusual cancellation, it is best to send me the whole thing so "cover" collectors can have a chance to buy them, too.

Conrad Fisher.

* Jos. R. Scherer, Los Angeles
R. C. Marble, Reseda California
Claude A. Becquet, Pleasant Valley, NY
Armin Doneis
David Garson
Charles Beard (twice!)
Benjamin Engel
The San Francisco Club
Mrs. J. N. Kennelty, Venetia, Pa.

According to a letter from the United States Information Agency, dated Jan. 27, 1961, a trial printing of a pamphlet in Esperanto is to be made soon. The pamphlet chosen is titled "Living Documents of American History." An English edition has not yet been published.

URGENT

To avoid World War III, the UN must become a Federal Union like the USA. We have only two years to accomplish this by getting the UN TO ADOPT ESPERANTO.

We can't wait for people to learn Esperanto in our schools. Let's adopt the slogan "Teach Each Other Esperanto". Call your friends together for a single evening using the method suggested in our free leaflet. To get details & free textbook, write the

ESPERANTO LIBRARY,
Middleton, Wisconsin.

Morto de Luis Hernández
La 12an de januaro, 1961, mortis
Luis Hernández Lahuerta, fondinto kaj
eksredaktoro de la Boletín de la Federa-
ción Española de Esperanto, pro hepata
malsano.

I shall get the 1961 Membership Address List ready to be issued in August, hope to have it in the mails in September. I shall omit addresses of all members whose dues are payable in August, but are still unpaid. Look at your membership card; if it reads: "Valid until Aug 1961" be sure you send remittance to the Treasurer (or if necessary to the secretary) no later than the 15th of August. Another thing: It will be sent ONLY TO THOSE MEMBERS WHO SPECIFICALLY ask for a copy. So let me know right away.

Conrad Fisher,
ELNA Secretary.

Sender:
ESPERANTO PRESS
Oakville, Ontario, Canada

Return and Forwarding Postage Guaranteed

SOME NEW PROJECTS FOR ELNA

Handbook on the "Why & How" of Esperanto study, mastery, use, propagation & organization

Monthly North American Esperanto Review greatly enlarged & improved
Paid Secretary & Central Office Staff

Paid Field Executive (Speaker-Organizer-Teacher)

Esperanto Exhibit & Demonstration Booth at New York's World Fair

Permanent Esperanto Exhibit near U N Headquarters

Speakers' Bureau & training courses
Special Feature Foreign-Esperantist Lecture-tours organized by booking agents

Esperanto-student Exchange & Demonstration Tour

Teachers' Preparatory Courses & Certification

School Essay Contest on Esperanto with Prize-trip to Universal Congress

Clipping Service & Rebuttal Department

Esperanto Services for Non-Esperantist International Specialists Conferences

Constant Stream of Fresh Publicity Leaflets, Folders & Brochures

North American Esperanto Book Publishing House

What others can YOU suggest? The possibilities are limitless!

How much do you want to see these projects materialize? How much are you willing to sacrifice to see them take shape? The least you can do is to become a Patron. Better yet, make your pledge to our Treasurer; send him a generous check regularly, each month!

Let's not be satisfied with a minimal program; let's get ELNA under way! Let's take the clamps off our pocketbooks; let's open our check books! Let the funds flow in!

Let's get the program on the road!

A. F. Doneis, chairman of
ELNA's Executive Committee.